

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 2

Marto / Aprilo 1974



La 26a kongreso de IFEF en Tarragona



La vidindaĵoj de nia ĉarma kongresurbo

Foto Grass

Mont-Serrat la sankta monto de Hispanujo

La monaĥejo datiĝas el la naŭa jarcento. La mirakla Mariastatuo, al kiu ĉiuj hispanoj pilgrimas, verŝajne estis trovata iom pli poste en kapelito en Monistrol, vilaĝeto situanta iom pli malalte. La araboj tute destruis ĝin dum sia invado en Hispanujo. Wilfred la Vilulo rekonstruis ĝin. La homa energio estas grandega, per primitivaj iloj kaj sur azenaj vojoj, oni sukcesis atingi la supron kaj konstrui la monaĥejon. Cetere, sur la supro staris jam kvar eremitejoj, de post la naŭa jarcento. En la jaro 976 la benediktanoj, kiuj havis monaĥejon en la najbara loketo Ripoll, ekposedis ankaŭ tiun monaĥejon. De la antaŭaraba monaĥejo ekzistas nur kelkaj kromkonstruaĵoj kaj unu galerio, kiun oni funde riparis en la jaro 1460. La benediktanaj monaĥoj, kiuj do eniris tie en la jaro 976, ankoraŭ havas sian sidejon tie nuntempe.

TARRAGONA

Proksimume 3-km-ojn norde de la urbocentro de Tarragona situas „Ciudad sin dical de Educacion y descanso“ (Sindikata rezidejo por edukado kaj ripozo). Tiu rezidejo estos la kongresejo de la 26-a IFEF-kongreso. La nomo kongresejo eble iomete trompas vian imagon, ĉar ĝi ne konsistas el granda konstruaĵo, sed el multaj i.a.:

- akcept-konstruaĵo, en kiu granda halo kun benkoj, tabloj ktp., kelkaj oficejoj, trinkejo, teraso;
- ĉefkonstruaĵo, kiu entenas i. a. manĝsalonon (sufiĉe grandan por 800 personoj), grandan kunvensalonon, bufedon, terason;
- butikcentro (memoraĵoj, trinkaĵoj, manĝaĵoj, frizoroj);
- multaj dometoj.

En tiu laste meciitaj dometoj, kiuj sistas en verdaĵo, maksimume 500 gekongresanoj dormos. Ĉiu dometo enhavas komunan ĉambrojn kaj unu, du aŭ tri dormĉambrojn por po du personoj. Krome ĉiu dometo havas banĉambrojn! Kuirejo ne estas en ĝi, ĉar oni manĝas en la granda manĝsalono.

Atentu la decembran numero de la „Internacia Fervojisto“ kiu donos pliajn klarigojn kaj alportos al vi unu aliĝilon por via informoj.

La katedralo datiĝas el la tempo de Filipo la Dua, potence elstaras malantaŭ la korto. Kaj, post ĝi, krutaj nudaj rokoj ortangule traboras la aeron, kvazaŭ ili ĉiunmomente povus fali sur la monaĥejon kaj la preĝejon.

La monaĥejo mem estas vasta kaj granda, sed nur parte vizitebla fare de la publiko. La preĝejo estas belega kun girlando de kapeloj apud la flankaj muroj. La preĝejo kaj la altaroj estas riĉe ornamitaj, kaj malantaŭ la ĉefaltaro, en aparta ŝranko, antaŭ kiu vico de ruĝaj lampoj brulas, staras la statuo de la gotika madono, kiu laŭ la hispana legendo estas skulptita per la Sankta Luko portita al Hispanujo per la Sankta Petro.

Ankaŭ malgranda muzeo estas tie kaj malgranda poŝtofiĉejo, kaj ekster la monaĥejo butikoj de nutraĵoj, k.t.p.

Antaŭ la 26a Internacia Fervojista Kongreso de Esperanto

Iom pri Tarragona-provinco

Specialan atenton meritas la du grandaj monaĥejoj de la Cister-Ordeno, kiuj troviĝas en la provinco Tarragona.

Unu el la plej malnovaj kaj eble la plej grava el la cistercianaj monaĥejoj, kiuj troviĝas en Hispanujo estas la monaĥejo „Santa Maria de Poblet“, kiu situas en la provinco Tarragona, en la suda parto de la montoj de Prades. Ĝi estis fondita en la jaro 1194 de la Grafo de Barcelona, Ramon Berenguer la IVa, kiu donacis al la monaĥoj de Font-Froide terenon nomitan „Populetom“ ĉar en ĝi kreskis „pobos“ (tremoloj) de kiu devenas la nomo Poblet.

Komenciĝis la konstruado de la monaĥejo en la XIIa jarcento kaj ĝi daŭris ĝis la komenco de la XVa. La konstanta protekto al la monaĥejo fare de la aragonaj reĝoj, kiuj uzis ĝin kiel panteonon, kaj speciale de Pedro la IVa kaj Martin „El Humano“, kiu konstruigis la nefinitan palacon, same kiel tiu de nobelaj familioj: Cervera, Cardona, Anglesola kaj Foch faris el la monaĥejo unu el la monumentaj mirindaĵoj el Hispanujo, de granda arkitektura merito kiel transira verko de la romanika al la gotika stilo, kaj prospera ekonomia kaj religia vivo, kio estis origino de aliaj monaĥejoj, ne nur en la provinco, sed ankaŭ en aliaj regionoj.

Novaĵoj pri la 59a UK Hamburg

En „Bulteno“ 1/74 paĝo 8 ni publikis unuajn komunikojn pri la 59a Universala Kongreso. Jen kelkaj detaloj:

La Germana Federacia Fervojo oficiale instalos informojn en la kongresejo, kie dum la tuta semajno oficiale deĵoros membroj de GEFA por doni ĉiuspeciajn informojn, vendos kaj mendos fervojajn biletojn, rezervigos por sidlokoj, kuŝ- kaj litvagonoj ktp. Tiuj kolegoj ankaŭ akompanos la specialan trajnon dum la tuttaga ekskurso.

Mardon, la 30an de Julio okazos la „**Fervojista Tago**“ por ĉiuj fervojistoj partoprenontaj en la kongreso. Provizora programo:

Fakprelego kaj kontaktkunveno en la fervoja direkciejo, komuna tagmanĝo, faka ekskurso al la haveno kun vizito al la granda Kontenera Terminalo kaj aliaj gravaj vidindaĵoj.

Daŭro porks. de 10 gis 17 horo.

Fervoja Terminareto

Restas stoko je via dispono. Vi nepre bezonas ĝin por bone kompreni fakajn artikolojn kaj alkutimiĝi al la fervojista lingvo. Krome ĝi estas bonvena donacaĵo. Ne forgesu aĉeti la terminareton germana-esperanta kaj esperanta-germana. La reduktia prezo: 5,- GM, ricevebla ĉe nia kolego G. Ritterspach, ZVL (AA 5005), Frankfurt/Main (Basa 955/3680).

Aŭtomata kuplilo

Testo pri harditeco sukcesis.

La aŭtomata vagonarkuplilo, per kiu la eŭropaj fervojoj volas konsiderinde plirapidigi la reltrafikon, sukcese faris antaŭ nelonge la unuan harditec-teston ĉe la plej peza vartrajno de la Germana Federacia Fervojo (DB). Dum preskaŭ 16 monatoj veturis tiu peza DB-trajno, la 4000 t peza erc-transportilo, inter Emden kaj Saarlando. Laŭ informo de la DB-direkcio Münster (Vestfalia) tiu vagonaro, instalita per la nova kuplilo,

transportis ercon de la marborda haveno ĝis la interno de la lando sen gravaj malfunkcioj.

Du pli malgrandaj eksperimentaj vagonaroj, sur kiuj la personaro kolektas spertojn pri la aŭtomata kuplilo, cirkulas prove ĉe Ottbergen (subdistrikto Hildesheim-Marienburg) kaj ĉe Würzburg. Krome trafikas en la distrikto Hannover kurtistanca vagonaro per tiu sistemo.

Nuntempe en la riparejoj de Bergedorf, Hannover, Hamburg, Fulda, Trier kaj

Neuigkeiten über den 59. Allgemeinen Weltkongreß in Hamburg

Im Bulteno 1/74, Seite 8, haben wir die erste Mitteilung über den 59. Weltkongreß veröffentlicht. Hier einige Einzelheiten:

Die Deutsche Bundesbahn wird im Kongreßgebäude einen offiziellen Informationsstand einrichten, wo während der ganzen Woche ebenfalls offiziell abgeordnete Mitglieder von GEFA Dienst tun werden. Die Kongreßteilnehmer bekommen dort Auskünfte aller Art, können Eisenbahnfahrtausweise erhalten oder bestellen, dgl. Platzkarten, Liege- und Bettplätze usw. Diese Kollegen werden auch den Sonderzug am Ausflugs-Tag begleiten.

Am Dienstag, dem 30. Juli, wird der **Eisenbahner-Tag** für alle im Kongreß anwesenden Eisenbahner durchgeführt.

Vorläufiges Programm:

Fachvortrag im Gebäude der Bundesbahndirektion, gemeinsames Mittagessen, Fachexkursion ins Hafengebiet mit Besichtigung des Container-Terminals und anderer Sehenswürdigkeiten. Voraussichtliche Dauer von 10 bis 17 Uhr.

Kleines Eisenbahn-Fachwörterbuch

Ein Vorrat steht zu Ihrer Verfügung. Sie brauchen es unbedingt, um Fachausdrücke gut zu verstehen und sich Eisenbahn-Fachausdrücke einzuprägen. Außerdem ist es ein willkommenes Geschenk. Vergessen Sie nicht das kleine Eisenbahn-Fachwörterbuch deutsch/Esperanto bzw. umgekehrt zu erwerben. Der ermäßigte Preis: 5,- DM; erhältlich bei unserem Kollegen G. Ritterspach, ZVL (AA 5005), Frankfurt/Main (Basa 955/3680).

Kaiserslautern estas preparataj sinsekve la plej taŭgaj el la 363 000 trakciiloj; kaj ankaŭ person- kaj varvagonoj estos ŝanĝkonstruataj por la estonta aŭtomatigado. La aŭtomata kuplilo estas cetere antaŭkondiĉo por la planitaj komputere regotaj „fantomaj manovraj stacioj“ kiel ekzemple en Seelze, kie vagonoj kaj vagonaroj povos esti kunmetataj preskaŭ sen homa laboro.

Esperantigis el „Neue Hannoverische Presse“ de Friedrich Busse

Aus den Gruppen

Hannover/Bremen

En Bremen vivas multaj anoj de la Internacia Lingvo. La granda kaj vigla grupo zorgas ĉiam por varia kaj interesa programo. Je la 13-an de Februaro '74 la fervojista grupo aranĝis kun la urbo societo preleg-vesperon. Plenplena estis la salono. Kiel gastoj partoprenis geamikoj el Nienburg (Weser) kaj Hannover.

Unue prelegis O. Rösemann pri diversaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Multaj kolorbildoj estis la taŭga kadro, tiel ke la ĉeestantoj ricevis pri Esperanto la ĝustan impreson. La bildoj pruvis, ke dum la kongresoj oni streĉe laboras. Speciale la nefervojistoj miris pri la faka laboro. Sur la ekrano estis videblaj bildoj el la terminara kaj fakprelega kunsidoj. Sed ankaŭ la distraj programpunktoj dum la kongresoj estas gravaj. Jen estiĝas valoraj amikaj kontaktoj trans la limoj.

Dieter Hartig prelegis pri faka temo. Li klarigis la vojon de la elektra forto de la „fabriko“ ĝis la lokomotivado. Tiu prelego estis interesa el lingvaj vidpunktoj. Krome ĉiuj lernis multe. Hartig pruvis, ke elektraj lokomotivoj estas pli ekonomiaj ol vaporlokomotivoj. Je la fino de bone aranĝita vespero la grupanoj proponis, ripeti similajn aranĝojn. La grupo ricevis ankaŭ la instigon, aranĝi komunajn migradojn, kiel ili estas jam longjara tradicio en la regiono Münster / Osnabrück.

roe

Osnabrück

Karnevalo en Osnabrück estas gravega afero, minimume en la rondo de Esperantistoj. En Februaro veturis geamikoj el Münster, Lohne

(Oldb), Hannover, Düsseldorf, Schwelm kaj aliaj mondurboj al la centro de la humoro. La salonoj de la lernejo Holtmann estis zorgeme preparitaj por la granda spektaklo. Girdandoj, kukoj, kolbasoj kaj vinoj atendis, por ke la gaja popolo travivu neforgeseblajn horojn.

Konataj „artistoj“ zorgis por gaja vespero. Margret, Gertrud, Adelheid, Heide, Willi, Heinz kaj Otto estis kelkaj geuloj, kiuj regis la scenojn. Ili rakontis mulajn ŝercojn kaj aventurojn. Estis vera kaj taŭga instigo por ĉiuj partoprenantoj, post la oficiala kunsido de la frezenuloj mem agi en la senco de reĝo karnevalo. Diligente oni kantis, dancis kaj trinkis. Tamen ĉiuj partoprenantoj vere aktive „kunlaboris“, la specialan laŭdon meritas familio Holtmann pro la nobla agado por nia gaja kaj verda (kaj poste „blua“) popolo.

roe

IFES 1974

Jen mallonga informo pri la 14 antaŭaj Internaciaj Fervojistaj Esperanto Skisemajnoj (IFES). La unuaj dek okazis en Aŭstrio sub la sperta gvido de Johano Geroldinger. Sekvis la 11a IFES en Ĉeĥoslovakio (Vratna Dolina apud Žilina), kiun organizis Ladislav Kovář kaj Ladislav Láni. La 12an IFES ni ĝuis en Francio (Châtel), senriproĉe kaj kun tipe franca ĉarmo aranĝita de Josette Bernier kaj Edmond Wurmser. Ankaŭ Spitzingsee en Germanio ravis pli ol 70 gepartoprenantojn, kien Elfriede Kruse kaj Kurt Jentsch invitis por la 13a skisemajno. Dum la 14a IFES denove kolektiĝis la internacia anaro en

Werfenweng (Aŭstrio), kie refoje Johano Geroldinger salutis „siajn“ geamikojn. Ĉi-jare (9. — 16. Februaro) Jovan Mirkovič kuraĝis inviti al Jugoslavio la 15an skisemajnon al la Pohorjmontaro super Maribor. Nur malmultaj informitoj sciis, ke origine Jovan Mirkovič planis okazigi tiun vintran semajnon sur Mala Kopa ĉe Slovenj Gradec. Sed pro obstakloj diversflankaj li fine kaj lastmomente invitis al la bela sporthotelo „Bellevue“ super Maribor. Sekve nia amiko Jovan ne havis multe da tempo por sin prepari pri la unuopaj programoj kaj el tio denove sekvis, ke vole-nevole la unuopaj partoprenantoj sentis sin devigataj mem aktivigi. Jovano zorgis improvizate tamen lerte — por la dumtaga programo, por la vesperoj sin trovis bonkoraj diverslandanoj kiuj pruvis, ke la fantazio ne havas limon. . . Eble la vesperaj programoj estus ankaŭ pli variaj, se pli da trinkaĵoj estus servitaj.

Pro diversaj privataj malhelpaĵoj multaj (francaj) gejunuloj mankis, inter alie niaj amikoj Johano Mevel kaj Gerard Horn. En Châtel, Spitzingsee kaj Werfenweng la junularo sub ilia gvidado organizis la distran programon. Malgraŭ ilia foresto — kaj la manko de neĝo sur Pohorje — okazis bonorde ĉiuj konkursoj (lingvaj kaj sportaj). Jovano antaŭzorgis pri radiotelefonoj inter starto kaj celo kaj per sia malgranda aŭto ĝisplafone plenpakita li transportis ĉion bezonatan. Eĉ liberan posttagmezon li sukcese plenigis per banado en la naĝa halo „Fontana“ de Maribor. Domaĝe nur, ke la Mariboraj esperantistoj pres-

kaŭ nur ĉeestis la sportajn aranĝojn kaj apenaŭ parolis la Internacian Lingvon. Kulmino de la semajno estis la transdonado de pokaloj kaj multnombraj donacoj al la gepartoprenantoj en ĉeesto de pluraj oficialuloj. La germanoj estis tre sukcesaj: La IFEF-premion hejmenportis Guido Brandenburg; samtempe la unua inter la progresintaj skiantoj. Krome ricevis premion Erika Landgraf kaj Werner Heimlich jun. Surprizon kaŭzis Gernot Ritterspach, ĉar li fulmrapide kiel unua trapasis la celon inter la sledantoj. Domaĝe ke la sledo ne eltenis tiun rapidecon. Restas al mi danki al Jovan Mirkoviĉ kaj liaj helpantoj pro multe da farita laboro. Ĝis ĉiu partoprenanto (entute 32 el 6 landoj) ricevis bone redaktitan IFES broŝuron kaj bele presitan diplomon. Krome eĉ du insignojn kaj fine ni ne forgesu la kristalfacetitajn vazojn kun surskribo IFES 74. Tiujn oni povis tre favorpreze aĉeti.

Ĉiuj partoprenantoj malĝoje sed esperplene adiaŭis per „ĝis revido en Plan Val Gardena“ (Grödnertal, Italio), kie nin venontjare akceptos la vaste konata geedza paro Gimelli.

Werner Heimlich jun.
Venonta skisemajno en Italio
 Post la jugoslavijaj kolegoj ankaŭ kuraĝas organizi „Internacian Fervojistan Esperanto-Skisemajnon niaj italiaj kolegoj.
 La 16a I.F.E.S. okazos en Plan-Val Gardena. De la fervoja kaj ŝosea linioj de „Brennero“ oni deflankiĝas je „Ponte Gardena“ kaj atingas Plan post preskaŭ 25 km per komfortaj aŭtobusaj servoj. Oni povas atingi Plan ankaŭ de la fervojstacio de Chiusa aŭ rekte de Bolzano.

Plan situas proksimume en altitudo de 1600 metroj. De ĝi oni facile atingas grandajn altecojn per telferoj, kablo-gondoloj, seĝoliftoj kaj aliaj multnombraj instalaĵoj por re-supreniri.

Nekrogologo

La 1an de Decembro 1973 mortis nia aktiva membro s-ino Juliana Bauer en la aĝo de 71 jaroj. Kun s-ino Bauer ni perdas animbonan delikatsentan virinon, kiu okupiĝis aktive kaj tutkore pri nia lingvo. Antaŭ 20 jaroj ŝi komencis lerni la Internacian Lingvon kune kun sia edzo en Nürnberg. Volonte ni ankoraŭ rememoras, kiam ŝi per belsona voĉo kun animo kaj sento deklamis Esperanto-poemojn dum niaj aranĝaĵoj. Pri la morto de sia edzo ŝi afliktiĝis tiel multe, ke poste oni vidis ŝin en Esperantorondoĵ nur tre malofte. La fervojista grupo Nürnberg neniam forgesos ŝin kaj ĉiam volonte rememoras pri ŝi.

GEFA-estraro

Aranĝoj

15a Eŭropa Feriosemajno en Svislando (EFS)

Organizita de Svisa Asocio de Esperanto - Fervojistoj (SAEF), ĝi efektivigos ĉijare de la 22^a ĝis la 28^a de Septembro 1974 en Magliaso ĉe la bordo de la Lugano-lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano, facile atingebla per fervojo aŭ aŭto. La programo ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, Esperanto-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn dinstrajn.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstraße 17, CH-5200 BRUGG (Svislando)

Internaciaj FERIAJ Kursoj Helsingør, Danlando

21. – 27. de julio 1974

Nur antaŭtagmeze okazas la instruado – en jenaj kursoj:

- 1) Elementa kurso laŭ metodo Friis. Ĝin povas partopreni anoj diversnaciaj, ĉar la metodo estas internacia kaj aplikas nur Esperanton. Per tiu metodo oni lernas pli multe ol per alia metodo dum unu semajno.
- 2) Konversacia Kurso. Multaj samideanoj bezonas parolekzercon, kaj tial tiu kurso estas tre grava. La gvidantino scias paroli ĉiujn en bonhumora kaj gaja maniero.
- 3) Perfektiga Studrondo. Stilo kaj formo de nia lingvo estas la ĉefaj temoj de la studronda studado kaj diskutado.
- 4) Prepara Kurso por Friis-metodaj geinstruistoj. Ĉi tiu metodo – simila al NATURMETODO – estas la metodo de la moderna tempo. Tial ankaŭ ni devas apliki ĝin, sed multaj samideanoj ankoraŭ ne konas ĝin. Tial ni invitas vin veni ĉi tien por studi ĝin praktike – kaj vi miros pro ĝiaj bonegaj rezultoj. Kurso n-ro 1 estas parto de ĉi tiu.

NB. Ankaŭ ne-kursanoj estos kore bonvenaj en ĉi tiu semajno.

La kursojn 1+4 gvidos s-ino Elin Andersen, Stubbekobing, la kurson 2 gvidos s-ino Tove Bak, Brabrand, kaj numeron 3 gvidos s-ro Moravec, Flensburg.

Posttagmeze ni aranĝos komunajn ekskursojn al diversaj vidinaj lokoj, ekz. al Kronborg (kastelo de Hamleto), Hillerød, kaj la kastelo Fredensborg. — Vespere ni aranĝos prelegojn, prezentadon de lumbildoj kaj filmoj, eble dancadon, kantadon kaj diskutojn. Sendu vian aliĝon per poŝtkarto al s-ro L. Friis, Inge-mannsvej 9, DK-8230 Aabyhøj, Danlando.

Nova presejo por nia Bulteno

Kiel ni meze de Februaro subite kaj tute surprizigite eksciis, la ĝisnuna presejo de „Bulteno“ abrupte ĉesis sian laboron. Pro tio ni tre rapide devis serĉi alian presejon kaj trovis ĝin en formo de ne tro granda, sed laborkapabla entrepreno en Herzberg (Harz). Tiel ni sukcesis, ke nek okazis interrompo nek eĉ komplikaĵoj. Ĉio fluas kiel ĝis nun kaj ankaŭ la ekstera aspekto apenaŭ ŝanĝis. Ni diras „apenaŭ“, ĉar la literoj aspektas iom alie. Ili estas iom pli klaraj ol la ĝisnunaj. Ni do esperas, ke la afero por ni tute ne havos malbonajn konsekvencojn.

Kaj krome: Ĉu vi jam rimarkis, ke la „kapo“ de nia Bulteno iomete modernigis kaj nun **ankaŭ** enhavas la signon de BSW?

26a I.F.E.F.-Kongreso — TARRAGONA

Kongreskotizo: La kongreskotizo nun sumiĝas ĝis 17. 4. '74: Ptas 800,— Pensiuloj kaj familianoj pagas la duonon. Detalojn pri programo kaj tranokt-kaj manĝeblecoj vi povas legi en la aliĝilo.

Kvinkilometra kromvojo por trapaso de kanalo

La alta ponto sur la kanalo de Norda al Baltika maro apud Rendsburg estas 60 jaraĝa. Inter la jaroj 1911 kaj 1913 ĝi estis konstruita por gvidi la fervojan linion Hamburg-Flensburg tiel alte super la akvovojo, ke ankaŭ la altaj marŝipoj povis ŝipveturi tra la kanalo senĝene. La ĝis 42 m. alta ponto konsistas el la reala pontkonstruaĵo, ĉirkaŭ 2500 m. longa kaj la ankaŭ 2500 m. longaj deklivoj tiel, ke la trajnoj devas entute veturigi kvin kilometrojn por trapasi la kanalon! Kiam la rendsburga altponto estis finkonstruita, ĝi laŭdire estis la plej granda elŝtala konstruaĵo en la mondo.

Proksimume 3,2 milionoj da nitroj kuntenas la trabaron el 17.200 tunoj da ŝtalo. Por farbigi la 236.000 kvadratmetrojn de la ŝtala surfaco oni bezonas, okaze de tri tavoloj, 230 tunojn da lakfarbo. Unufoje la farbado daŭras pr. ok jarojn; pluraj laboristoj ĉiam havas sufiĉe da laboro sur la ponto.

En ĉi tiu tempo la direkcio de la akvo- kaj ŝipveturaferoj kune kun la fervoja direkcio faras ampleksajn rekonstrulaborojn sur la ponto. Ankaŭ renovigo de la relvoja surkonstruaĵo okazos.

(el D.B. Blickpunkt 1974/1) trad. W. L. van Leeuwen

Paderborn. Nova lingvo-laboratoria Esperanto-kurso en la universitato de Paderborn okazis de la 8^a ĝis la 11^a de Aprilo.

Informoj UEA-delegito ĉe diplomattoj.

Okaze de la aŭstralia nacia festotago la 28-an de Januaro 1974 la ambasadoro de Aŭstralio, Ralph Harry, invitis ankaŭ la UEA-delegiton de la urbo Bonn, Erhard Herlitze, al solenaĵo. La UEA-delegito havis okazon paroli pri la Internacia Lingvo kun multaj ambasadoroj, politistoj kaj oficistoj.

Miliona gazeto. La okcidentgermana junulara revuo „Bravo“, la plej granda siaspeca en la mondo, kun eldonkvanto de unu miliono da ekzempleroj, responde al letero de legantino aperigis mallongan informon pri Esperanto, kio kaŭzis la tujan mendon de 70 lernolibroj ĉe la eldonejo.

Darmstadt. Post intensa informado en la Teknika Altlernerjo ok studentoj anoncis sin por Esperanto-kurso.

Saarbrücken. En la vintro semestro en la universitato de Saarbrücken disvolviĝis du Esperanto-kursoj: unu por progresintoj kaj seminario pri la originala Esperantoromano. Ambaŭ kursojn partoprenis po ok studentoj. La seminario okupiĝis pri la demando de literatureblo de planlingvo, romantipologio kaj selektitaj ekzemploj el la Esperantoromano. Ĉiu partoprenanto ekzamenis unu romanon laŭ formala (struktura, rakontoteknika), enhava kaj lingva vidpunktoj.

Redaktfino por n-ro 4/1974 estas la 10. 6. 1974